

Christian Morgenstern,  
Por konsoli amikon pri lia  
am-aflikto

*tradukita de Willy Nüesch*

Ni devas ree renkontiĝi ĉiam  
kaj suferadi unu per l' alia,  
ĝis ĉion tion ĉi ni benos iam.

En tiu tago la sufer' foriĝos,  
sufer' almenaŭ, kiun blindo teksis,  
kaj kiu nin arbar-en-ŝtorme fleksis.

En novan celon ni kaj vivon tiam  
kiel riveroj en la mar' kunfluos,  
kaj plu nenia apartiĝ' nin skuos.

Finfine tiam la "...ne serĉas sian"  
en niaj koroj kiel ver' sin ankros.  
Kaj al ni forto kaj feliĉ' ne mankos.

*Traduko de la Germana poemo "Einen  
Freund über seinen Liebeskummer zu  
trösten" de CHRISTIAN MORGENSTERN  
(Kristiano Matenstelo, \*1871-05-06 -  
†1914-03-31) en Esperanton de WILLY  
NÜESCH (Etselstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon,  
Svislando, \*1927-05-09).*

*Arg-71-139 (2013-08-28 18:39:29)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Etselstr. 6,  
CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, tele-  
fono: +41-(0)31-302 66 56)donis al mi,  
Manfred Retzlaff, la permeson publikigi sia-  
jn poem-tradukojn en mia interreta poem-  
kolekto „Argiope.blOrg.net“. Li ankaŭ kon-  
trosis tiun ĉi elpresadon kaj mi korektis ta-  
jperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko  
aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro  
274 en Oktobro 2003.*

Christian Morgenstern,  
Einen Freund über seinen Liebeskum-  
mer zu trösten

Wir müssen immer wieder uns begegnen  
und immer wieder durch einander leiden,  
bis eines Tages wir das alles segnen.

An diesem Tage wird das Leiden weichen,  
das Leiden wenigstens, das Blindheit zeugte,  
das uns wie blinden Wald im Sturme beugte.

Dann werden wir in neues Ziel und Leben  
wie Flüsse in ein Meer zusammenfließen,  
und kein Getrenntsein wird uns mehr verdrießen.

Dann endlich wird das »... suchet nicht das Ihre«  
Wahrheit geworden sein in unsern Seelen.  
Und wie an Kraft wird's uns an Glück nicht fehlen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas CHRISTIAN MOR-  
GENSTERN (Kristiano Matenstelo, \*1871-05-06 - †1914-03-  
31).*

*Arg-71-138 (2004-02-01 11:34:56)*

*Die von Herrn Willy Nüesch verfasste Übersetzung ist in der  
internationalen Literaturzeitschrift "Fonto", Nr. 274 vom Ok-  
tober 2003, erschienen.*